

Theodor Storm,  
Kristnaska kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

De la ĉielo ĝis la tero  
malsupren ridas milda stel’;  
de l’ abiar’ odor-aero  
blovadas spire tra l’ etero  
kaj nokte regas brila hel’.

Plenigas min ĝojiga timo.  
Ja estas nun la sankta hor’!  
Sonoras en la malproksimo  
preĝeja sonoril’. – Sen limo  
feliĉa estas mia kor’.

Min ree tenas sorĉo pia.  
Adore, mire staras mi,  
aperas al animo mia  
infana songo idilia.  
Miraklo estas tio ĉi.

*Traduko de la Germana poemo “Weihnachts-  
lied” de THEODOR STORM (Teodoro Stormo,  
\*1817-09-14 – †1888-07-04) en Espe-  
ranton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred  
Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde,  
Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-107-216 (2003-12-25 22:06:31)*

Theodor Storm,  
Weihnachtslied

Vom Himmel in die tiefsten Klüfte  
Ein milder Stern herniederlacht;  
Vom Tannenwalde steigen Düfte  
Und hauchen durch die Winterlüfte,  
Und kerzenhelle wird die Nacht.

Mir ist das Herz so froh erschrocken,  
Das ist die liebe Weihnachtszeit!  
Ich höre fernher Kirchenglocken  
Mich lieblich, heimatlich verlocken  
In märchenstille Herrlichkeit.

Ein frommer Zauber hält mich wieder,  
Anbetend, staunend muß ich stehn;  
Es sinkt auf meine Augenlider  
Ein goldner Kindertraum hernieder,  
Ich fühl’s, ein Wunder ist geschehn.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas THEODOR STORM  
(Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04).*

*MR-044-2b / Arg-107-215 (2003-12-26 06:22:34)*